# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-29 n-ro 400


## Peruo: indigno post la pardono konsentita al la eks-diktatoro Alberto Fujimori




Ukrainia registaro kaj ribeluloj okazigis grandan interŝanĝon de kaptitoj

Ĉinlando ekigis projekton por utiligi WeChat-on kiel identigilon

Aŭditaj vortoj formas la cerbon

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Peruo: indigno post la pardono konsentita al la eks-diktatoro Alberto Fujimori
*La familioj de la viktimoj kontestas tiun decidon p. 03*

Ukrainia registaro kaj ribeluloj okazigis grandan interŝanĝon de kaptitoj
*La plej granda interŝanĝo de kaptitoj de post la eksplodo de la konflikto en aprilo 2014 p. 04*

Ĉinlando ekigis projekton por utiligi *WeChat*-on kiel identigilon
*Same kiel pasporto aŭ ordinara identiga karto p. 04*

Aŭditaj vortoj formas la cerbon
*La unuaj tri jaroj en la vivo de infano estas aparte gravaj por ties evoluo p. 05*

Tertremo de Mesino 1908
*Katastrofa tertremo p. 06*

Hodiaŭe
*Andromeda p. 06*

# Peruo: indigno post la pardono konsentita al la eks-diktatoro Alberto FUJIMORI

Du tagojn post la polemika pardono konsentita al Alberto FUJIMORI, fare de Pablo KUCZYNSKI, ambaŭ viroj esprimiĝis, ĉiu el sia flanko. La eks-diktatoro publikigis videon en Fejsbuko. Siaflanke, la nuna prezidento de Peruo aperis ĉe la televido. Ambaŭ provis minimumigi la krimojn de la diktaturo.



«Mi konscias, ke la rezultoj de mia registaro estis parte bone akceptitaj, sed mi ankaŭ agnoskas, ke alia parto de miaj kunlandanoj elreviĝis. Mi elkore pardonpetas».

Per tiuj vortoj filmitaj en lito de malsanulejo marde la 26-an de decembro 2017, kaj publikigitaj en video en Fejsbuko, Alberto FUJIMORI pravigis sian reĝimon. La eks-diktatoro, 79-jara, esprimiĝis por la unua fojo de post sia pardono, kiu okazis du tagojn antaŭe. Li plenumis de post 2009 punon je 25 jaroj da malliberejo, pro koruptado kaj krimoj kontraŭ la homaro. Lia liberigo indignas multajn peruanojn.

Ĉi-dimanĉon, la kolero, kion ili manifestis sur la stratoj ekde la anonco de la pardono, estis ankaŭ direktita kontraŭ la prezidento Pedro Pablo KUCZYNSKI, kiu iniciatis tiun «humanitaran» decidon, kvankam dum sia balotkampanjo, li promesis ne liberigi lin.

**Proceduro ĉe tribunalo**

Sed la familioj de la viktimoj de la diktaturo FUJIMORI kontestas tiun decidon. Ili anoncis, ke ili iniciatos proceduron ĉe internacia justico, cele nuligi tiun pardonon. En Limao, pli ol kvin mil personoj manifestaciis lundon vespere.

Carmen AMARO estas la fratino de unu el la viktimoj de la masakro de la *Cantuta*, unu el la krimoj kontraŭ la homaro imputita al la eks-diktatoro Alberto FUJIMORI. Laŭ ŝi, la ekskuzoj de la diktatoro ne estas kompletaj, kaj ne sinceraj.

«Estas aflikte, ke li mencias nek la viktimojn, nek ties familiojn, nek nian suferon, ŝi indignas. Agnosko pri la suferitaj damaĝoj neniam okazis. 25 jarojn post la malapero de mia frato, tiu pardono revigligas denove la suferojn, kaj vundas nian dignecon. Krome mi pensas, ke la deklaro de FUJIMORI ne estas sincera. Ĝi rezultas de premoj, kiujn li travivis. Ni devas rememori, kiu vere estas Alberto FUJIMORI, kaj kion li reprezentas en nia lando».

«Ni pensas pri la proceduro, kion ni iniciatos. Ni defendas nian rajton akiri justecon. Motivigas nin tiu rajto. Kaj ankaŭ la engaĝiĝoj, ke neniam ni forlasos la viktimojn».

La prezidento spertas alian malfacilaĵon. Lia jam malforta plimulto, plu reduktiĝas. Tri deputitoj de lia partio eksiĝos el la parlamenta grupo signe de protesto. El registara informfonto, ankaŭ la kunministro pri la homaj rajtoj demisiis: ministreja reorganizado estas atendota post kelkaj tagoj.

Neniam Milito Inter Ni

# Ukrainia registaro kaj ribeluloj okazigis grandan interŝanĝon de kaptitoj

La Ukrainia registaro kaj porsendependiĝaj ribeluloj en la orienta parto de la lando merkrede [27 dec 2017] efektivigis la plej grandan interŝanĝon de kaptitoj de post la eksplodo de la konflikto en aprilo 2014, laŭ la raportoj.




Ukrainia Prezidento Petro POROŜENKO skribis en la socia komunikilo *Facebook*, ke dum la interŝanĝo, la ribeluloj en Donecko kaj Luhansko transdonis 74 ukrainiajn soldatojn kaj registarolojalajn civilulojn al Kievo.

Samtempe, la Luhanska Inform-Centro sub la regado de la ribeluloj diris, ke la registaro liberigis 75 subtenantojn de luhanskaj ribeluloj, sed du el ili rifuzis reveni al la regiono regata de la ribeluloj.

Darja MOROZOVA, rajtoprotektisto de la memdeklarita Donecka Respubliko, diris, ke finiĝis ankaŭ la interŝanĝo de kaptitoj inter Kievo kaj Donecko. Ŝi tamen ne specifis la nombron da homoj, kiuj estis transdonitaj al Donecko.

Ukrainiaj amaskomunikiloj diris poste, ke Kievo transdonis 238 homojn al la regiono regata de la ribeluloj kaj 165 el ili iris al Donecko.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Ĉinlando ekigis projekton por utiligi *WeChat*-on kiel identigilon

Merkrede la 27-an de decembro la ĉina gazeto "*South China Morning Post*" informis, ke la registaro de la provinca regurbo Kantono komencis ĉi-semajne projekton por utiligi la popularan poŝtelefonan programeton "*WeChat*" por identigi siajn uzantojn, same kiel per pasporto aŭ ordinara identiga karto.



Laŭplane post kelkaj tagoj tiu eksperimenta projekto trafos la tutan provincon – Gŭangdongo aŭ Kantonio – kaj oni volas jam ekde la venonta januaro testi ĝin ankaŭ tutlande.

Uzante la teĥnikosciencon pri vizaĝrekono, kiu plialtiĝas en Ĉinlando, per tiaj virtualaj dokumentoj oni povos ekzemple registriĝi en hoteloj aŭ uzi kelkajn servojn ĉe registaraj organizaĵoj sen bezono prezenti la ordinaran identigilon.

Kune disvolvas tiun projekton la Ĉina ministerio pri publika sekureco kaj la ĉina interreta firmao "*Tencent Holdings*", kiu posedas "*WeChat*"-on.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Aŭditaj vortoj formas la cerbon

La unuaj tri jaroj en la vivo de infano estas aparte gravaj por ties evoluo. Kiel tio kion oni diras al ili efikas en diversaj kampoj, tion esploras sciencistoj kaj ili konkludas: Parolu pli kun infanoj!



En bunta jaketo kaŝiĝas eta sonregistrilo. Ĝi estas vortonombrilo. Pli ol 2 400 infanoj en la orientusona marborda urbo Providenco ĝis nun ricevis tian jaketon. Tiel registriĝis ĉiam denove ĉiuj vortoj kiujn la infanoj estis aŭdintaj dum la tuta tago. Minimume 15 000 vortojn, sed plej bone ĉirkaŭ 21 000 vortojn aŭdu, laŭ la sciencistoj, infanoj sub tri-jaraj ĉiutage por ke ilia cerbo povu plej bone disvolviĝi. Sed en Providenco kelkaj el la registriloj estis montrintaj je la fino de la tago precipe en sufiĉe malriĉaj familioj malpli ol 6 000 vortojn, diras sciencistino.

Ŝi estas mem patrino de eta filo, instruistino, kaj de kelkaj jaroj ŝi gvidas la programon "Providenco parolas" kiu funkcias ekde la jaro 2014. Tiu programo helpu al la infanoj de tiu urbo aŭdi kaj paroli pli por tiel povi pli bone disvolviĝi. Fine de la jaro laŭcele partoprenu ĉirkaŭ 2 500 infanoj.

Helpe de la specialaj registriloj kiuj povas nombri vortojn kaj eĉ parolturnojn, la progreso de la infanoj ĉiam denove estas registrata. Ĉe endomaj vizitoj, en ludgrupoj aŭ en partoprenantaj infanvartejoj la procezo estas priparolata kaj analizata. Por progresoj oni atribuas stelojn. "Ĉe pli ol du trionoj de la familioj la nombro de paroladoj signife plialtiĝis", diras la estrino de la programo. En la jaro 2017 la paroladoj plialtiĝis je ĉirkaŭ 74 procentoj. "Ni vidis vere bonegajn progresojn", ŝi diras.

La programo memkompreneble celas unuavice infanojn - sed ĝi helpas ankaŭ ofte al la gepatroj. "Nia laboro komenciĝas ofte per tio ke ni unue rekonas kiel malfacile estas esti gepatroj", diras la estrino. "Ĉiuj venas al ni ĉar ili deziras la plejan bonon por sia infano, sed pli poste la gepatroj ofte diras al ni kiom la programo alportis al ili mem". Ankaŭ kelkaj bone instruitaj prizorgantinoj de infanoj nur per la registriloj rimarkis ke ili entute nur parolis sufiĉe malmulte.

La registriloj elfiltras ĉion kio devenas de la televidilo aŭ de aliaj ciferecaj aparatoj. "Ĉar ni ankaŭ rimarkis ke ekde kiam la televidilo estas enŝaltita, okazas malpli da parolado."

Pli ol kelkaj horoj da telespektado ĉiutage povas ĉe etaj infanoj ankaŭ konduki al malpli da taŭgeco por la lernejo, precipe ĉe infanoj el sufiĉe malriĉaj familioj. Studaĵo el la universitato de Novjorko montris ke ju pli infanoj spektis televidon, precipe se tio estis pli ol dum du horoj en tago, des pli malbonaj estis iliaj scipovoj de matematiko kaj ilia kogna sinregado. Ju malpli la gepatroj vivenspezis, des pli signifaj fariĝis la negativaj efikoj.

La vorto-programo el Providenco estos plivastigata. Ĝis la somero de la jaro 2018 oni volas partoprenigi 500 novajn familiojn kaj baldaŭ la programo ankaŭ funkciu en aliaj urboj. "Ekzistas grandega intereso", diras la estrino de la programo.

En Usono disvastiĝas alia simila programo en kiu oni volas atentigi kuracistojn, flegistinojn kaj gepatrojn kiom gravas paroli jam kun tre etaj beboj. Flegistino parolu jam rekte post la naskiĝo kun la bebo. Ili ekzemple kantu jam tuj "Ĉion bonan al vi" kaj tiel montru al la bebo ke tio estas tute normala konduto.

Esperanta Retradio

# Tertremo de Mesino 1908

La 28-an decembro estas la datreveno de la katastrofa tertremo, kiu en 1908 frapis la markolon de Mesino kaŭzante 80 000 mortintojn en Mesino (el 130 000 loĝantoj) kaj minimume 15 000 en la vidalvida *Reggio di Calabria* (el 45 000 loĝantoj).



La okazintaĵo restis tiel vive en la kolektiva memoro, ke ankoraŭ hodiaŭ (post pli ol unu jarcento) en Mesino, kiam oni volas paroli pri "granda malordo", oni diras "*è stato un ventotto dicembre*" ( = okazis iu dudekoka de decembro).

Ankaŭ la esperantista gazetaro okupiĝis pri la evento:


- "*La Revuo*", III, 1908-1909, p. 300-308 aperigis longan raporton; oni povas legi kaj deŝuti ĝin ĉe la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno (vidu).

- "*Espero katolika*" 1909-51 (januaro-februaro 1909), p. 24-25, ankaŭ raportis, kaj invitis al solidaro;

- "*Brita Esperantisto*" 1909-50 (februaro 1909), p. 21 (vidu), invitis partopreni en la monkolekto arangîta de UEA;

- "*Roma Esperantisto*" 1908-12 (decembro 1908) dankis, kaj menciis monoferojn venintajn el eksterlando, inter kiuj "50 frankoj estas donaco de Dro L. Ludoviko ZAMENHOF".

Antonio DE SALVO
Esperanto-vivo



## Bildo de la tago

**Andromeda galaksio.**

**Vikipedio**